

INTERNACIA SCIENCA ASOCIO ESPERANTISTA  
(I.S.A.E.)

Generala kunveno, mardon la 5-an de aŭgusto 1952 je la 16-a horo, en la universitato de OSLO dum la 37-a universala kongreso de Esperanto.

Prezidas s-ro Carl Støp-Bowitz, Norvegujo, vicprezidanto de I.S.A.E., ĉar la prezidanto, profesoro D-ro M. Fréchet el Parizo, estas malhelpita partopreni la kongreson.

Ĉeestas la kunvenon 27 personoj el 12 diversaj landoj nome:

Argentino: E. Balech; Aŭstrujo: H. Sirk; Britujo: C. M. Bean, H. Evans, I. Lapenna, G. Marin; Danujo: P. Neergaard; Finnlando: V. Setälä; Francujo: F. Boyet, J. Guillaume; Germanujo: H. Rissom; Italujo: G. Campetti; Japanujo: F. Egami; Nederlando: J. G. R. Isbrucker, C. J. Keur; Norvegujo: O. Reiersøl, O. Rykkvin, L. Sandberg, C. Støp-Bowitz, N. Utne; Svedlando: B. Gerdman, N. Henning, S-ino E. Julin, T. Julin, K. Moberg, O. Olssen, F. Turner.

1. kaj 2. La prezidanto malfermas la kunvenon; bonvenigas la ĉeestantojn kaj prezentas projekton de tagordo nome:

1. Malfermo.
2. Aprobo de tagordo.
3. Elekto de sekretario por la kunveno.
4. Estrara raporto pri 1951 kun ekonomia raporto.
5. Revizora raporto.
6. Demando pri malŝarĝo de la estraro.
7. Budĝeto por 1953.
8. Propono de la prezidanto ke eksprezidantoj fariĝu komitatanoj supernombraj (sen voĉdonrajton en la komitato).
9. Diskuto pri la demando ĉu I.S.A.E. devus transpreni la aranĝon de la kongresa sekcio pri scienco kaj tekniko kaj de la internacia somera universitato (I.S.U.).
10. Propagando.
11. Demando pri la fondo de terminologia sekcio kaj elekto de gvidanto por la sekcio.
12. Terminologia laboro.
13. Aliaj demandoj.
14. Fermo.

La kunveno aprobas la prezentitan tagordon.

3. La prezidanto proponas ke oni elektu sekretariojn por la kunveno; nomata estas s-ro Corn. J. Keur el Nederlando.

4. Skizo de la jarraporto pri 1951 estas disponigata; post tralegado ĝi estas ĉiuvoĉe aprobatita kun dankesprimoj al la sekretario de I.S.A.E.

5. La revizora raporto komunikas ke la financaj aferoj de la jaro 1951 estas trovitaj en korekta stato.

S-ro V. Setälä ŝatus ke en la estonteco la supervidajo estu tiel formulita ke estas menciata la kapitalo je la komenco de la financa jaro kaj je la fino.

Prof. Sirk faras kelkajn rimarkojn pri la malfacilaĵoj en la internacia pago de abonoj k.t.p. kaj D-ro Campetti petas klarigon pri la rilato de la eldonisto J. Muusses en Purmerend kun I.S.A.E. kaj pri la koncerna sumo menciata en la „Elspezoj” de la jaro 1951.

La prezidanto klarigas ke la eldono de Scienca Revuo estas je propra risko de la eldonisto. La sekcioj de I.S.A.E. en Britujo kaj en Nederlando abonas rekte al Muusses por siaj membroj, sed aliaj delegitoj al la sekretario-kasisto de I.S.A.E. transsendas la tutan kotizon (minus sia rabato) kiu inkludas abonon de Scienca Revuo. La sekretario-kasisto transdonas la koncernajn sumojn al Muusses; pro tio la mencio sub la titolo „Elspezoj”.

6. La kunveno malŝarĝas la estraron por la jaro 1951 kaj decidas ke la revizora instanco por la jaro 1951 ankaŭ plenumu la kontrolon pri la kaso de la nuna jaro.

7. Budĝeto por la jaro 1953 estas malfacile starigebla; la kasisto s-ro Alexandersson tamen faris. El ĝi evidentiĝis ke la financa stato de la asocio en la venonta jaro povas esti konsiderata kiel kontentiga, kompreneble kun la kutima rezervo pro cirkonstancoj.

La kunveno aprobas la budĝeton '53 post klarigoj de la prezidanto.

8. La prezidanto proponas ke la kunveno esprimu sin pri la dezirindeco ke en la estonteco la ekzistantaj prezidantoj de I.S.A.E. laŭmerite apartenu al la rondo de la komitato de I.S.A.E. Ili ne havu voĉdonrajton kiel la laŭ la ĝisnuna statuto nomitaj komitatanoj. Per la proponita formo oni povos konservi rilatojn utilajn por nia asocio.

La kunveno aprobas la proponon, aldonante la kondiĉon ke la koncernaj personoj restu anoj de la asocio.

9. La demando ĉu I.S.A.E. devus transpreni la aranĝon de la kongresa sekcio pri scienco kaj tekniko estas konsiderata diversflanke.

Pro la celo de I.S.A.E. estas tute komprenebla afero ke I.S.A.E. intencas havi povon en la aranĝoj de tiu sekcio, la prezidanto rimarkas. La deziro estas ke I.S.A.E. proponu al U.E.A. ke oni formulu: la aranĝoj por la tielnomita Dua Sekcio estu afero de I.S.A.E. en kunlaboro kun U.E.A., ĉar en tiu sekcio temas pri sciencaj aferoj, tereno de I.S.A.E. La samo povas validi rilate la aferojn de la Internacia Somera Universitato (I.S.U.).

S-ro F. Boyet rimarkas: estas dezirinde ke la partopreno al tiu sekcio restu ebla al ĉiu kongresano. Oni projektu konkrete la manieron de aranĝado ĉar ĝi ne estu nur formala ŝanĝo. Koncerne la prelegojn de I.S.U. s-ro Boyet opinias ke iomete altigo de la kongresa kotizo povas valori por ke ĉiu kongresano povu ricevi la prelegojn kiel presitan eldonajon.

Prof. I. Lapenna deklaras ke pri la afero ne ekzistas konkurenco inter ambaŭ instancoj. La propono estis farita antaŭ kelkaj jaroj al I.S.A.E. en la persono de s-ro Alexandersson aranĝi la nomitan sekcion, sed I.S.A.E. ne povis fari pro cirkonstancoj. Pro tio U.E.A. aranĝis ĝin. Verŝajne en la sekvonta jaro U.E.A. aranĝos en la universala kongreso nur tri sekciojn anstataŭ kvar. Ĉar la laboro-formo de pasintaj jaroj oni povas ŝanĝi laŭ bezono.

Koncerne la internacian someran universitaton la aferoj estas aliaj. Estas la intenco ke estu estontece I.S.U.-prelegoj en grandaj universitataj centroj pri diversaj temoj. Plue la plej simpla solvo rilate la disvastigon de la prelegoj estus ke la I.S.U.-prelegoj estu vendotaj pere de la libro-servoj de la Esperanto-organizaĵoj.

El la diskuto en kiu partoprenas plue I-ro J. G. R. Isbrücker, d-ro G. Campetti, prof. E. Balech, s-ro F. Boyet, prof. H. Rissom evidentiĝas ke la difino pri scienco diferencas laŭ landoj; I.S.A.E. akceptis la larĝan nocion pri scienco. La I.S.U.-tereno estas pli granda ol tiu de I.S.A.E., ĉar en I.S.U. ankaŭ ekzemple pri Artoj povas temi.

La prezidanto rimarkas ke estas la propono de I.S.A.E.-estraro ke ĉio kio koncernas sciencon en la kongresa kadro okazu per aŭ en interkonsento kun I.S.A.E.; temas pri principa demando, kaj li, resumante la esprimatajn opiniojn formulas ke la kunveno esprimas la deziron kaj rekomendon: La sekcio „Scienco kaj Tekniko” de la Universalaj Kongresoj de Esperanto kaj la sciencaj prelegoj de la Internacia Somero-Universitato estu aranĝataj de U.E.A. kaj I.S.A.E. en daŭra kunlaboro kaj interkonsente.” La kunveno konfirmas esprimi sin tiel.

La kunsido estas finata, kaj daŭrigota jaŭdon la 7-an de aŭgusto '52.

Generala kunveno, jaŭdon la 7-an de aŭgusto 1952 je la 14-a horo, en la Universitato de Oslo.

Prezidas s-ro Carl Støp-Bowitz; sekretario de la kunveno s-ro Cornelis J. Keur; ĉeestas 15 personoj el 9 diversaj landoj, nome:

Argentino: E. Balech; Aŭstrujo: H. Sirk; Britujo: A. Mildwulf; Danujo: P. Neergaard; Francujo: F. Boyet; Italujo: G. Campetti; Japanujo: F. Egami; Nederlando: J. G. R. Isbrücker, C. J. Keur; Norvegujo: C. Støp-Bowitz, S. L. Haugen, O. Reiersøl, O. Rykkvin, P. Vasmoen; Svedlando: K. J. Moberg.

La prezidanto komunikas pri ricevitaĵoj leteroj:

1e letero de Prof. M. Fréchet en kiu li anoncas sian deziron ekŝiĝi kiel prezidanto;

2e letero de la germana sekcio de I.S.A.E. en kiu letero oni protestas kontraŭ la dualismo inter I.S.A.E. kaj la Dua Sekcio de U.K.E. kaj plendas pri la ne-regula apero de „Scienca Revuo” eldonata de Muusses.

Rilate la unuan leteron la prezidanto esprimas sinceran bedaŭron pri la

intenco de prof. Fréchet ekŝiĝi kiel prezidanto, kaj rilate la duan leteron la prezidanto referencas al la priparoloj kaj deziresprimoj en la kunsido de mardo la 5a de aŭg. kaj al la tiam jam donitaj informoj pri la Revuo.

10. La tagordo mencias „Propagando”.

Prof. H. Sirk proponas ke oni disponigu, se oni petas pri tio, al la anoj pli da ekzempleroj de Scienca Revuo por ke tiuj ekzempleroj povu esti disdonataj al interesiĝantoj. Ankaŭ estas dezirinda, represado de special-valoraj artikoloj el S.R., ekzemple pri Sanskrito kaj Esperanto.

La prezidanto emfazas la gravecon de la esprimataj ideoj por pli bona informado pri Esperanto en sciencistaj rondoj. Se oni bezonas kromajn ekzemplerojn de S.R., peto estu adresata al Muusses, la eldonisto, kiu laŭ eblo certe agos.

11 kaj 12. Pri la starigo de terminologia sekcio la prezidanto komunikas ke alvoko aperis; ĝis nun 8 membroj anoncis sin; grupo do povos esti formata; pri centra persono aŭ prezidanteco ankoraŭ neniu decido estas farita.

S-ro I-ro J. R. G. Isbrücker rimarkigas ke terminaraj aferoj tuŝas la Akademion kaj atentigas pri la fakto ke la akademiano s-ro J. Okamoto estas la centro por teknikaj vortaroj k.s.a. La Akademio certe ŝatas la kunlaboron kun I.S.A.E. ankaŭ pri terminologiaj aferoj.

S-ro F. Boyet opinias ke por ĝusta evoluo de la laboro la komisiono estu dividata estontece en subkomisionojn por la diversaj specialaj terenoj kaj Prof. E. Balech faras kelkajn rimarkojn pri la eldono de fakaj terminaroj flanke de I.S.A.E. aŭ de la komisiono; ili povus esti disvastigataj per U.E.A.

Kelkaj ĝeneralaj rimarkoj estas farataj pri diversaj sciencaj afiksoj.

La prezidanto dankas pro la diversaj valoraj rimarkoj kaj promesas ke la estraro agos laŭpove.

13. Ronddemando.

La prezidanto komunikas: kiel sciante, la neceso montras sin ke la diversaj akademaj gradoj kaj titoloj estu kompareblaj laŭ signifo por akiri esperantlingve ĉie en la mondo klare kompreneblajn nomojn; li taskis sin kun tiu studo.

Prof. H. Sirk esprimas la deziron ke ankaŭ la fakterminoj pri la universitata vivo estu inkludataj en tiu studo.

Prof. E. Balech opinias utila ke I.S.A.E. formu tiucele ankaŭ studkomisionon. Estus tamen samtempe ĝuste esplori ĉu UNESKO mem, jes aŭ ne pritraktas la temon aŭ intencas fari tion. Kontaktante tiumaniere kun UNESKO oni povos tie ankaŭ scii pri la agado de I.S.A.E.

La prezidanto deklaras ke li klopodos etendi la studon pri universitataj gradoj kiel proponite, kaj ke la estraro esploros la kontaktmanieron kun UNESKO por la menciita celo, atentigas ankoraŭ pri la biblioteko de I.S.A.E., petas sendi ĉiujn sciencajn publikaĵojn en Esperanto aŭ en alia lingvo kun Esperanta resumo al la bibliotekistino de I.S.A.E. kaj

14. fermas la kunvenon.

Corn. J. Keur.